

& La nigra ŝalo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 496 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Aleksandr Puŝkin (1820). El rusa tradukis Sergej Rublov (2000). Baladigis (2015) Martin Strid per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado, ŝanĝante pronomon "mi" al "li".>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dore mi mimi mimido re lfa;fa mimimi mimimi mimido re lfa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×16)+

(&Strofoj:

'1 /Freneze li spektas la nigron de ŝa2l',
; kaj koron senviglan turmentas fata2l.

(×: **En la ĉen'** ; **Dancu nun trankvile** ;
Ĉiuj ni trankvilas ; **Jen en amika**
ĉen' ; **Dancu nun trankvile.**)

'2 En lia juneco, kun vanta anim', ; Li
amis juninon pasie, sen fin'.

'3 Plenigis lin amo kun ĉarmo kaj fort',
; sed baldaŭ ĝin rompis severo de sort'.
.....

'4 Jen foje dum gaja amika festen' ;
envenis hebreo kaj flustris kun trem':
.....

'5 "Amuzon vi havas, senzorgas vi pli, ;
sed dume perfidas junino al vi".

'6 Li kraĉe insultis pri tiu afer', ;
serviston alvokis en kruda sever'.

'7 Kun sklavo fidela li rajdis sen tim', ;
forestis indulgo en lia anim'.

'8 Jen vidas li pordon, lin kaptas angor',
; malhelpas okuloj, ekstremas la kor'.

'9 En ĉambron li venas, post blanka
kurten' ; juninon perfidan karesis
armen'.

'10 Ekservis la koro; ekbrilis ponard' ...
; kaj ĉesis abrupte la kiso kun ard'.

'11 Kaj korpon senvivan li tretis sen
fin', ; rigardis silente al pala junin'.

'12 Memoris li kriojn... sed venĝis
rigor', ; pereis junino kaj amo-trezor'.
.....

'13 Demetis li ŝalon kaj poste per ŝal' ;
silente li viŝis la sangon de ŝtal'.

'14 La sklavo dum nokto, en nigra
silent', ; forĵetis la korpojn al onda
torent'.

'15 Okulojn plej ĉarmajn ne kisas li plu,
; forpasis amuzoj kun gajo kaj bru'.

'16 Freneze li spektas al nigro de ŝal', ;
kaj koron senviglan turmentas fatal'.
.....)